

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
1. LUTY 1927 FEBRUARO

Nr. 2. N-o

POSTĘPY ESPERANTA W POLSCE.

W PRZEDMOWIE do jednego z podręczników języka Esperanto, wydanego w roku 1912, przytoczony został epitet, jakim ochrzcił Esperanto któryś z dziennikarzy. Epitet ten brzmiał: „Esperanto to uprzykrzona mucha, której nie można się pozbyć”. Tak myślano w Polsce przed 15 laty. Traktowano nasz język jako natręta, uporczywie narzucającego się społeczeństwu polskiemu, a to względem niego zachowuje się jak wobec uprzykrzonej muchy: odpędza go od siebie. W dwa lata po owym charakterystycznym określeniu Esperanta nadszedł kataklizm dziejowy: wojna światowa. Europa zamieniła się na dwa obozy, pełne karabinów i armat; dwa obozy nie mające nic wspólnego z takimi zagadnieniami kulturalnymi, jak kwestja języka międzynarodowego. Jedynek językiem był wówczas przez kilka lat tylko język armatni i karabinowy, którym porozumiewały się narody świata... Ale im dłużej trwała wojna i nadchodził czas dyplomatycznych rokowań, tembardziej w obydwu obozach odczuwano potrzebę przemówienia do narodów nie biorących udziału w krwawych zapasach.

I stała się rzecz dziwna: w huk armat i grzechot karabinów wmieszała się propaganda prowadzona przez oba obozy, państwa centralne i koalicję: w języku pokoju: Esperanto. Każda strona usiłowała przekonać państwa neutralne w tym języku, że ona a nie obóz przeciwny ma słusność, że ona się tylko broni, a przeciwnik napastuje. W ten sposób Esperanto został po raz pierwszy oficjalnie przez państwa uznany i użyty. Po wojnie potrzeba jego wzrosła jeszcze bardziej. Kongresy pokojowe, Liga Narodów, radjo, oto pola, na których język międzynarodowy okazał się niezbędny. Dawna mucha stawała się coraz mniej uprzykrzoną, zaczęto o niej coraz więcej i coraz przychylniej myśleć i mówić, a nawet próbować i do szkół wprowadzać.

Polska, jako państwo nowe, wojną najwięcej zniszczone, nie mogła dotąd poświęcić naszemu językowi tyle czasu i uwagi, jakby życzyli sobie

tego esperantyści polscy. Wierzymy jednak, że na wszystko odpowiednia pora nadejdzie. Tymczasem zaś stwierdzmy, że i w Polsce wiele na korzyść Esperanta się zmieniło.

Przedewszystkiem w prasie. Dobry początek dał krakowski „Ilustrowany Kurjer Codzienny“, który szczerze i stale ruch esperancki popiera. Za jego przykładem poważne artykuły o Esperancie w innych dziennikach polskich stały się coraz częstsze, że wymienię tylko: Myśl Niepodległą, Nową Reformę, Nowy Kurjer Polski, Dziennik Bydgoski, Kurjer Lwowski, Kurjer Warszawski, Głos Narodu, Ziemię Lubelską, Robotnika Śląskiego, Radjofon Polski, Expres Kaliski, Robotnika i w. i. Stanowisko nieżyczliwe dla Esperanta w prasie polskiej należy już prawie do wyjątku.

W naczelnych urzędach Rzeczypospolitej nastrój dla Esperanta jest coraz przychylniejszy. Oto do zanotowania mamy fakty takie, jak przyjęcie delegacji esperantystów przez b. ministra Sujkowskiego, następnie przez Pana Prezydenta, Prof. Mościckiego, a zarazem trudno nie wspomnieć, iż na kongresie w Wiedniu przemawiał tak wspaniale urzędowy przedstawiciel Państwa, minister Lasocki, że nad grobem Zamenhofs przemawiał wice-minister spraw zagranicznych, Dr Grabowski, że wreszcie protektorem zjazdu krakowskiego był p. wojewoda b. Min. Darowski. Oto oznaki, że w sferach rządowych Esperanto nie jest już uprzykrzoną muchą, ale sprawą, o której warto myśleć. Mamy wiele innych dowodów na to, że Rząd Rzeczypospolitej sprawy naszej nie lekceważy i poważnie się nią zajmuje.

Zarazem i społeczeństwo polskie poddaje rewizji swój stosunek do Esperanta. Nie możemy powiedzieć, by ogół był nam już przychylny, ale tymczasem niech wystarczy stwierdzenie, że ustąpiła dawna nieżyczliwość. Dziś można już o Esperancie dyskutować, bo większość społeczeństwa rozumiała, że Esperanto to ani rzecz żydowska, ani antypolska, ani komunistyczna, ale język neutralny służący temu, kto go zna, i w takich celach, do których chce się go użyć. Jako sprawdzian tej zmiany nastroju społeczeństwa niech służy okoliczność, że VIII. kongres pocztowców odbyty w u. r. w Wilnie przyjął jednomyślnie rezolucję za Esperantem, i że jednym z wniosków, złożonym do prezydium zjazdu nauczycielskiego szkół powszechnych w Warszawie (listopad u. r.) był wniosek „Ogniska“ warszawskiego o czynne poparcie Esperanta przez nauczycielstwo polskie. A więc praca nasza pierwsze owoce wydawać zaczyna. Najważniejsza część już zrobiona: pierwsze lody, lody niechęci już ustępują. Nadszedł czas drugiego etapu pracy esperanckiej: zamiany czającej się jeszcze obojętności na przychylność dla naszego języka.

Leopold Kronenberg.



MEZAJ KAJ ALTAJ LERNEJOJ EN POLUJO.

Ok jarojn de l'sendependa vivo de pola ŝtato karakterizas intensa laboro en la fako plej grava por ĉiu ŝtato: fako lerneja. La polaj lernejoj, kiuj dum longaj jaroj de l'mallibero estis subpremataj, trovis en la tempo de l'politika sendependeco tre zorgan registaran apogon kaj subtenon.

Ligante siajn penojn kun la gloraj tradicioj de la Eduka Komisiono el la epoko antaŭ la dispartigo de Polujo la Ministerio de publika instruado komencis tuj prepari la fundamentojn de publika edukado en Polujo, kiel per la vojo leĝdona, tiel ankaŭ per praktika plialtigo de la nivelo de polaj lernejoj.

La rezultojn de tiu ĉi laboro oni povas jam nun konstati, rigardante la statistikon de la lernejoj en Polujo.

Lasante nun flanke la aferon de la popollernejoj, pri kiuj ni parolos en aparta artikolo, ni skizas nur la rezultojn en la fakoj de l'meza kaj alta instruado.

En la jaro 1919, do tuj post la politika liberigo, la Ministerio de publika instruado prilaboris la „Sciencon programon por la mezlernejoj“. En ĉi tiu programo celanta reformon de la instrua plano de la gimnazioj, oni turnis antaŭ ĉio la atenton je la t. n. „didakta fundamento“. Laŭ tiu ĉi programo la pola gimnazio estas lernejo 8-klasa tiel organizita, ke sur la sama 3-jara ĉeffundamento, nomata gimnazio malsupra, staras 5-jara gimnazio supera, posedanta 3 tipojn: gimnazio matematik-

naturscienca, gimnazio humanista (kun latino) kaj gimnazio klasika (kun la lingvoj latina kaj greka). Krom tio oni faris prove tipon neohumanistan, sen la lingvoj klasikaj, havantan kiel la didaktan fundamenton la patrujan kulturon.

En la tipo matematik-naturscienca la didaktan bazon formas sekvantaj lernobjektoj: matematiko, fiziko, kosmografio, naturscienco, kaj manlaboro.

En la tipo humanista la didaktan bazon formas la lingvoj: pola, latina, unu lingvo „monda“ (angla, franca aŭ germana) kaj historio.

En la tipo humanista la didakta bazo konsistas el la klasika filologio, do la lingvoj latina kaj greka kaj la klasika kulturo.

En privata mezlernejo ekzistas libereco por novaj kaj originalaj didaktaj vojoj; la programoj de privataj gimnazioj povas diferenci de la ŝtataj programoj, tamen la privatlernejo devas rezulte posedi la samajn fundamentajn celojn, kiujn havas la lernejo ŝtata.

Cifere la nuna stato de pola lernejararo estas jena:

En Polujo ekzistas 786 mezaj lernejoj, en tio 267 ŝtataj kaj 519 privataj; knabaj mezlernejoj estas 313, knabinaj 252, koedukaj 221.

Plej granda nombro de la mezlernejoj apartenas al la tipo humanista: 499. La tipon matematik-natursciencon posedas 97 gimnazioj, klasikan 88, neoklasikan 16, neohumanistan 4, licean 19. Dutipaj estas 61 gimnazioj.

Koncerne la instrulingvon posedas Polujo kelkajn dulingvajn ŝtatajn gimnaziojn: 3 germanajn, 6 rutenajn (ukrainajn) kaj unu ortodoksan seminarion kun la rusa instrulingvo.

El la privataj gimnazioj estas 83 alilingvaj: 34 germanaj, 4 pol-germanaj, 14 rutenaj, 14 rusaj, 3 blankrutenaj, 2 litovaj, 2 francaj, 2 kun la hebrea, 5 kun juda (jidiŝ) instrulingvo.

En la lernojaroj 1925/26 vizitis la mezlernejojn 220.922 gelernantoj.

Koncerne la altlernejojn estas rimarkinde, ke en la momento de l'politika reviviĝo de Pola ŝtato ĝi posedis 2 universitatojn (Kraków, Lwów), 1 politeknikon, 1 akademion veterinaran kaj 1 minejakademion.

Dum la germana okupado (1915-1918) oni revivigis la universitaton kaj la politeknikon en Warszawa.

La kreo de l'universitato en Poznań, revivigo de l'malnova universtato en Wilno kaj dono de akademiaj privilegioj al la Krakow'a altlernejo de

belartoj okazis jam en la tempo de plena sendependeco de Polujo.

En tiu ĉi tempo oni faris malfacilan laboron: organizon de studoj.

Ĉar en Polujo mankis kelkfoje sufiĉa nombro de altlernejaj profesoroj, oni invitis al la katedroj multajn polojn instruantajn en eksterlandaj universitatoj kaj krom tio zorgis por ligi kun la altlernejoj novajn fortojn profesorajn.

La plua konstruado de altlernejaroj, tiel en preparado de novaj ejoj, kreado de laborejoj kaj sciencaj helpilaroj, kiel ankaŭ en kreado de novaj katedroj, marŝas bone antaŭen.

Tamen tiu ĉi plua konstruo trovas multajn malfacilaĵojn, ĉefe pro la grandega alfluo de l'junularo al la altlernejoj.

Por kompletigi la bildon de la pola meza kaj alta lernejaroj oni devas ankoraŭ aldoni, ke Polujo posedas 120 lernejojn fakajn kaj kelkajn altlernejojn komercajn.

laŭ *Esperanto-Press*.



WŁADYSŁAW ST. REYMONT.

SUPER LA ABISMO.

(DAURIGO).

Ĉar jen denove ĝi ekbruligis la torĉon de ribeloj.

Denove ĝi kondukas la mondon kontraŭ li!

— Postesignon mi ne restigos post ci... Mi surtrotos cin morte, la kadavron ordonos pendigi kaj skurĝi per vipoj! — li minacis senforte.

— Kaj se ci?... — li ne finis la teruran penson, retiriĝis profunden, malproksime de la fenestro, la haroj hirtiĝis, ĉar li subite ekvidis, kvazaŭ proksime antaŭ si, ian timigan scenon.

— Ne! Ne! Ne! — li kriis furioze, ĵetante sin en la salono, sed

baldaŭ kvietigis sin, forskuis la timogon kaj ordonis:

— Aerostaton!

Sed en la kastelo estis jam nek unu, la lastan nokton resto de la aerostatoj malaperis ie senpostesigne.

Li maĉis tiun informon, kvazaŭ plenmanon da najloj, kiuj ŝiris liajn intestojn, tamen li ne retirigis, ne obeante la petojn kaj konsilojn de korteganoj, forveturis en kirasa aŭto eĉ sen gardo... Sur la ponto liganta la urbon kun la kastelo regis nedirebla ĥaoso, amaspuŝis sin taĉmentoj sendataj al batalkampoj, karavanoj da ambulansoj, kanonoj, kirasveturiloj, ĉevaloj, kolonoj municiaj — miloj da homoj, bruo da krioj, knaroj kaj malbenoj, galopoj de preterkuranta kavalerio, ĉio ĉi portis sin kun bruo, kvazaŭ ondoj de furioza rivero, kaj de la kontraŭa flanko, de la urbo, tiris sin tutaj armeoj da venkitoj, tutaj kohortoj da vunditoj, irantaj piede, sen armiloj, en ĉifonoj de uniformoj, palaj, mizeraj, bandaĝitaj per sangaj ĉifonoj, similaj al fantomoj, irantaj en terura, silenta amasego, en muta minaco...

Li veturis malrapide, alrigardante explore la vizaĝojn; multaj lin rekonadis, nek unu krio levigis je lia honoro, oni deturnis la okulojn, kaj iafoje insulto ekflustriĝis kaj bajoneto ekbrilis minace, kaj malmolaj, akraj rigardoj kvazaŭ ŝtonoj faladis kontraŭ lia vizaĝo.

Li forturnis sin de ili kun rideto de malŝato.

Sed en la urbon li enveturis kun sveniga sento de kaŝita timo, kvan-

kam li kuraĝe rigardis la homojn, rektiĝis fiere kaj provoke, atendis danĝeron, volis, ke oni lin rekonu — tamen la urbo kvazaŭ lin ne rimarkis, li traveturis fremda kaj nekonata meze de l' amasoj nekalkuleblaj kaj strange, minace silentaj; la stratoj estis plenaj, la placoj similis ŝanceliĝantajn arbarojn, moviĝantaj trotuaroj plenplenaj je homoj preterŝoviĝis kiel ĉiam, grandegaj kafejoj svarmis pro amasoj, kaj sur la balkonoj, fostoj kaj tegmentoj, ĉie flirtis standardoj de ribelo. Kaj samtempe silente estis kvazaŭ en tombo, la amasoj moviĝis kiel ombroj, nenie flustro, nenie krioj, nenie pli vivaj vortoj, nek eĉ gestoj, nur ĉies okuloj glitis konstante malkviete sur nigraj, grandegaj tabuloj, starigitaj sur la placoj, kaj iafoje la tuta urbo kvazaŭ formortis por momento, subaŭskultante en turmentiga mutiĝo iajn eĥojn malproksimajn... Li pretervidis nek unu detalon, nek unu vizaĝon, nek impreson; vidis plezure mizeron en ĉiu domo, en ĉiu vizaĝo pruvis malsaton longan, malsaton persistan, kaj sur ĉiu strato alrigardis ruinojn, malsatojn kaj detruon.

Kaj longe tiel li rondveturis en la urbo, kvazaŭ malsata vulturo serĉanta manĝon, kiam subite sur la nigraj tabuloj komencis elsaltadi oraj literoj de depeŝoj el la batalkampo; nekalkuleblaj amasoj legis ilin kun preĝa atento, nekalkuleblaj svarmoj drinkis ilin per la ravitaj okuloj, fine subite furioza, tremiga muĝo ŝiriĝis el la gorĝoj:

— Venko! Venko!

Frenezio kaptis la metropolon, ĉiuj sonoriloj ekĝemis ĝoje, ekludis orkestroj, miloj da standardoj ekflirtis super la kapoj kaj el la brusto de l' amasoj ekfluis kanto ĉielira, la sankta himno de la popoloj, la himno de libereco, profunda kiel ĉielo, potenca kiel batalo, senlima kiel sufero, himno-huragano kaj ventego kaj tondroj.

Kaptis lin tiu kanto kaj tremigis la potenco de ĝojo, ke li aŭskultis kaj rigardis ilin jam sen kolero kaj malamo, sed ordonis reveni, ĉar ek-sentis sin strange laca kaj terure malgaja ĝis la larmoj, kiuj premiĝis al la okuloj kiel venenaj, brulantaj pikiloj.

Kaj kiam li ree trovis sin en sia turo, kiam ekrigardis la grizan gigan-tan urbon, li eksentis sin tiel dolore sola, ke li ekdeziris homan societeton, volis aŭdi voĉojn, volis ekvidi viza-ĝojn amikajn kaj fidelajn rigardojn — sed kien ajn li sin turnis, disversi-ĝis silento, fariĝis tima malpleno, la homoj ŝtoniĝis, la servistaro respon-dadis time, la tuta vivo agoniis sub lia rigardo, la teruro de l' majesteco faris ĉirkaŭe glacian dezerton, kaj li vagis tra la salonoj sennombraj, tra surda silento de muroj kaj homoj, soleca kiel ĉiam kaj kiel ĉiam kvazaŭ ekster la mondo.

* * *

La tago jam estingiĝis kvazaŭ ago-niantaj okuloj kaj ŝutis grizan, mor-

tan silenton. Regulaj paŝoj de l' gvardio aŭdiĝis en la koridoroj, kaj sub la kastelo meze de krepuskoj kovritaj per nudaj arboj svarmis den-saj ripozejoj soldataj kaj nigris vicoj da kanonoj kaŝitaj kvazaŭ brutoj kun etenditaj gorĝoj, la pluvo faladis kaj fluetis sur la muroj senĉese kiel ploro nekvietigebla kaj iafoje krio de l' maro, stormoj de l' ondoj kaj bruo de l' vento penetris ĝeme en la ka-meron kaj disfluis en la silento de l' timo, kaj nur la voĉoj de l' horoj le-viĝis iafoje kaj bruis malĝoje.

Kaj li denove sidis sur la antaŭa loko alrigardante la blindan ondon kaj aŭskultante la pezan sorton aten-dis ĉiam pli malkviete. Subite li eksonoris perforte.

Enŝoviĝis time la gvardia oficiro.

— Ankoraŭ nenion, neniajn infor-mojn — respondis al liaj okuloj.

Li ekridis moke.

— Kaj la urbo jam ĝojas... Mi mem aŭdis.

— Ĝi estas malvero de iliaj ĉe-foj. Ĝi...

— Mi volas scii la veron... Aten-das ĝin!

— Ĉiuj komunikiloj interrompitaj kaj mankas rimedo...

— Mi volas havi la informojn! — li ektondris minace.

La oficiro malaperis, kaj post li eniris mallaŭte nigra, eta homo kun ora kruco sur la brusto.

(daŭrigota).



EL LA VOJAĜO.

...KAJ SALUTAS VIN, AROMANTA,
SUNPLENA, VARMA ITALLANDO,
KIE SUR ĈIELO BRILANTA
DORMAS EMALIA GIRLANDO.

SUPER VIA KAP' RADI-ORA
EKVOLVIS ĈIELO ARGENTON,
KAJ NUN PER LAZURO KOLORA
EKMONTROS OKULOJ KONTENTON.

EKBRILOS FELIĈE POEMAJ:
AMO, SUNO KAJ FLORAJ ONDOJ
KAJ FLUGOS OKULOJ RIDEMAJ
AL LAZUR-MALPROKSIMAJ RONDOJ...

KAJ ĜOJAN ALPORTOS LA AMON
EL MALPROKSIMAĴOJ BRILANTAJ:
MANPREMOJN, PASIAN KIS-FLAMON
PROMESOS OKULOJ AMANTAJ...

...VESPERE — ĈARMEGON SUBTILAN
DONOS „*DOLCE CHIARO DI LUNA*“,
ĜOJON ARBOJ DEZIROK TRANKVILAN,
BRUOS KORDO PER VOĈO SUNA...

KAJ EKSONOS — „ITALIANA“
MOLE, KVAZAŬ VOĈO VIRINA
„*LA CANZONA NAPOLITANA*,
CHE SI CANTA CON MANDOLINA“.

JULJAN TUWIM.

TRADUKIS E. RYTENBERG.



REGULARO

DE LA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

AKCEPTITA LA 1. XI. 1926 DUM TUTPOLLANDA KONFERENCO DE
ESPERANTO EN KRAKÓW.

FONDO. NOMO.

§ 1. La pollanda esperantistaro organizita en societoj, unuiĝoj, grupoj kaj rondoj decidis en konferenco de delegitoj, speciale por tio komisiita, instalaj rajtigitan reprezentantaron de l' esperanta movado en Polujo.

§ 2. La tiucele elektita konstanta reprezentantaro agos kiel ekzekutiva komitato en la nomo de ĉiuj liberevole aniĝintaj esperantistaj organizaĵoj. Ĝi ne dependas de la leĝo pri unuiĝoj kaj havas la nomon: Pollanda Esperanto - Delegitaro.

CELO.

§ 3. La P. E. D. havas la taskon zorgi pri akcelo de l' esperanta movado laŭ ĉiu celutila maniero.

La P. E. D. proklamas kiel sian ĉefan principon absolute neŭtralan labormanieron, ebligantan al ĉiucelaj esperantistaj unuiĝoj kunlaboron en ĉi tiu fundamenta kadro, se ili observas la saman ĉef-principon.

LABORKAMPO.

§ 4. La P. E. D. ne influas la internajn aferojn de la societoj, reprezentataj en ĝi, escepte, kiam la societoj mem tion postulas aŭ kiam konforma interveno estas necesa por forigi malhelpojn al la komuna laboro kaj al la reputacio de la esperanta movado.

KONSISTO DE P. E. D.

§ 5. Ĉiu esperantista rondo aŭ societo en Polujo, havanta maksimume

20 plenrajtajn anojn, delegas en la P. E. D. unu reprezentanton. Se ĝi havas 21 - 50 membrojn, ĝi delegas du reprezentantojn, ĉe pli ol 50 membroj la nombro de reprezentantoj estas tri, ĉe pli ol 100 membroj ĝi rajtas delegi kvar, ĉe pli ol 200 membroj kvin reprezentantojn. Plenrajtaj estas membroj, posedantaj aktivan kaj pasivan balotrajton, laŭ ilia societa regularo. La elektita reprezentanto estas nomata delegito.

§ 6. Lokaj grupoj de ligoj, asocioj, unioj, minimume dekmembraj, validas kiel memstare elektantaj societoj. Anoj de pli malgrandaj lokaj grupoj aŭ filioj estas alkalkulataj al la ĉeforganizaĵo.

§ 7. Persono, ne estanta lingvo-kapabla esperantisto, ne povas esti elektita kiel delegito.

§ 8. La elekto validas por unu jaro. Reelekto estas permesita.

§ 9. Se delegito ne povas plenumi sian oficon dum mallonga tempo aŭ nur ĉe difinita okazo, li devas zorgi, ke la organizaĵo aŭ societo de li reprezentata povu ĝustatempe nomi taŭgan anstataŭanton.

§ 10. La P. E. D. povas koopti kiel konsilantojn aliajn esperantistojn aŭ Esperanto - amikojn nedelegitajn de unuiĝoj, se ilia kunlaboro estas dezirinda. La konsilantoj rajtas voĉdoni ĉe konferencoj de P. E. D.

§ 11. La P. E. D. laŭinstance funkcias per:

- a) Konferenco de Pollanda Esperanto-Delegitaro.
- b) Kunsido de Plena Komitato de P. E. D.
- c) Kunsido de Ekzekutiva Komitato de P. E. D.
- d) Distrikta konferenco de P. E. D.
- e) Kunsido de Distriktestraro.

ORGANOJ DE P. E. D.

§ 12. La estraro de P. E. D. nomata Plena Komitato konsistas el la Ekzekutiva Komitato kaj la distriktestroj.

§ 13. La konferenco de P. E. D. elektas ĉiun duan jaron la Ekzekutivan Komitaton konsistantan el minimume kvin personoj, plejeble loĝantaj en sama urbo. Ili varbas laŭ bezono fakajn referantojn.

§ 14. La Konferenco de P. E. D. ne difinas la oficojn de la elektitaj anoj de la Ekzekutiva Komitato. Nur la prezidanton de P. E. D. nomas la Konferenco senpere.

§ 15. Ĉiu vojevoda distrikto, kiu delegas minimume kvin delegitojn, elektas ĉiun duan jaron distriktestraron, konsistantan minimume el unu estro kaj ties anstataŭanto. Vojevodaj distriktoj kun malpli ol kvin delegitoj aliĝu al unu el la najbaraj distriktoj.

§ 16. Laborregularojn por ĉiuj organoj de P. E. D. fiksas la Ekzekutiva Komitato.

KONFERENCIOJ.

§ 17. La Ekzekutiva Komitato de P. E. D. devas kunvoki ĉiujare almenaŭ unu Konferencon de Pollanda Esperanto-Delegitaro.

§ 18. La distriktestraroj kunvokas almenaŭ dufoje dum la jaro distrik-

tan konferencon aŭ konferencon por ia teritorio, parto de la distrikto aŭ por kelkaj distriktoj. La daton kaj tagordon de ĉiu distrikta konferenco oni devas komuniki al la Ekzekutiva Komitato de P. E. D. almenaŭ dek tagojn antaŭe.

§ 19. En la konferenco de P. E. D. devas la delegitoj partopreni persone. Ili povas tamen anstataŭigi sin per alia delegito de la sama aŭ de alia distrikto. En okazo de anstataŭo ne povas unu delegito reprezenti pli ol du forestantajn delegitojn. Ĉiu anstataŭo devas esti skribe atestita de la anstataŭiginta grupo.

§ 20. Ĉiujn konferencojn povas ĉesti ankaŭ nedelegitaj esperantistoj kiel gastoj, sed ili ne rajtas partopreni en la diskutoj, fari proponojn aŭ voĉdoni.

§ 21. Ĉiuj diskutoj aŭ proponoj en la Konferenco de Pollanda Esperanto-Delegitaro okazas principe en la lingvo Esperanto. La protokoloj estas skribataj esperante.

DECIDIOJ.

§ 22. Ĉiuj instancoj de P. E. D. decidas per simpla plimulto de la voĉoj.

Dutriga plimulto de la voĉoj de ĉiuj delegitoj estas necesa por sekvantaj decidoj de P. E. D.:

- a) ŝanĝo de la organizo de P. E. D. aŭ de la principoj, fiksitaj en ĉi tiu regularo;
- b) oficialaj intervenoj ĉe ŝtataj aŭtoritatoj, publikaj institucioj kaj organizoj, kiuj estas gravaj por la tutpollanda esperanta movado;
- c) koopto de konsilantoj laŭ regulo de § 10;

d) nuligo de decidoj faritaj de la Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

§ 23. Decidoj alprenitaj ĉe distrik-taj konferencoj kaj ĉe kunsidoj de distriktestraroj estas nepre tuj skribe komunikotaj al la Ekzekutiva Komitato de P. E. D.

§ 24. Se la Ekzekutiva Komitato ne aprobas decidon de distriktestraro, tiam la distriktestraro povas apeli al la Plena Komitato de P. E. D. kaj se ankaŭ ĉi tiu rifuzas sian aprobon, al la Konferenco de P. E. D.

§ 25. Ĉiu organo de P. E. D. povas ankaŭ decidi per skriba interkonsento, laŭ speciala regularo. Tiaj decidoj bezonas por sia valideco la subskribon de du trionoj de ĉiuj, kiuj rajtas voĉdoni.

KOTIZOJ.

§ 26. P. E. D. enspezas jaran kotizon por elspezoj de la Ekzekutiva Komitato. La kotizon fiksas ĉiujare la Konferenco de P. E. D.*).

ADMINISTRA JARO.

§ 27. La administra jaro kuras de la 1. januaro ĝis la 31. decembro.

§ 28. En okazo de malligo de P. E. D. pri la tuta havaĵo disponas la lasta Konferenco de P. E. D. Se la Konferenco ne povus okazi, la lasta Ekzekutiva Komitato transdonas la havon al ia parenca organizaĵo.

*) La konferenco fiksis la kotizon provizore je 5 gr. monate por ĉiu grupano.



ESPERANTISTA MOVADO.

XIX. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN DANZIG.

Dato: La XIX. Universala Kongreso de Esperanto en Danzig okazos 28. Julio ĝis 4. Aŭgusto 1927.

Patrono de la kongreso: S-ro D-ro Heinrich Sahn, Prezidanto de l' Senato de la libera urbo Danzig.

Loka Kongresa Komitato: Honora prezidantino: S-ino Anna Tuschinski. Prezidanto: S-ro Bernhard Aeltermann, Del. de UEA. Vicprezidanto: S-ro Kazimierz Majorkiewicz. Financoj: S-ro Kurt Sachsze. Sekretarioj: F-ino Käthe Marquardt kaj F-ino Schulz. Gazetaro: S-ro Edm. Fethke kaj S-ro Ernst Grabowski.

Kotizo: Por ĉiuj kongresanoj sen diferenco laŭ landoj: 25 danzigaj gul-

denoj aŭ 20 germanaj markoj aŭ 1 angla funto aŭ 25 svisaj frankoj. Por blinduloj senpage.

ALIĜO. Samideanoj dezirantaj aliĝi al la XIX-a bonvolu uzi la aliĝilon eldonitan. La aliĝiloj estos dissendataj per la esperantaj gazetoj.

HELPKONGRESANOJ. Samideanoj, kiuj ne povos ĉeesti la XIX-an, helpos al ĝia bona sukceso aliĝante kiel helpkongresanoj. Ili pagas la kongresan kotizon kaj ricevos la kongres-insignon kaj ĉiujn kongresajn dokumentojn.

AFIŜOJ. La kongresaj afiŝoj estas sendataj al ĉiuj de ni konataj adresoj. Samideanoj, firmoj kaj institucioj, kiuj

povas elmeti ilin videble, sendu siajn adresojn por senpaga ricevo de la afiŝoj. (Uzu respondkuponojn).

KONGRESA SERVO DE UEA. Por faciligi la partoprenon de la kongreso al kiom eble plej multe da personoj, UEA starigis servon de kombinita biletaro kiu entenas ĉion: kongreskotizo, aranĝoj, ekskurso al Zoppot, sestaga restado kun manĝo ktp., kiel la Turistaj biletoj eldonitaj okaze de la XVII-a kongreso en Genevo. La biletoj jam nun povas esti mendataj.

A (unuaranga): 200 Fr., B (duaranga): 160 Fr., Ĉ (simpla): 125 Fr.

K R O N I K A Z A G R A N I C Z N A.

AEROLOGICZNE OBSERWATORJUM w Tateno (Japonia) wydało wyłącznie po esperancku swoje sprawozdanie naukowe o 220 stronicach druku, formatu 23×30 cm. z licznymi diagramami, tablicami i ilustracjami.

BELGIJSKA SZKOŁA policyjna w Antwerpii prowadzi stale kursa esperanta.

FINLANDCY URZĘDNIICY kolejowi wysłani w oficjalnej misji przez swój rząd, celem zbadania europejskich urzędzeń kolejowych, przejechali i zwiedzili 15 państw posługując się tylko esperantem.

HARCERSTWO OGÓLNOŚWIATOWE zaczęło wydawać swój organ esperancki „Skolta Heroldo“.

KSIĘGARNIA BERLIŃSKA Mosse urządza reklamę świetlną esperanta po ulicach Berlina.

LEKSYKON HISZPAŃSKI „Espasa“ podaje wszystkie nazwy także po esperancku.

MINISTER PRACY Rumunii p. Tannen-lasi (esperantysta) przewodniczył ostatnio na 6-tym Rumuńskim Kongresie Esperanckim w Galato.

La „Kombinita Biletaro“ devas esti mendata ĉe Universala Esperanto-Asocio, 12 Bd. du Théâtre, Genève.

BICIKLA EKSKURSO AL LA XIX. KONGRESO. La sekciono por propagando ĉe „Societo Esperanto“ en Kraków aranĝas biciklan ekskurson al la XIX. La vojo estos, depende de la eventuala nombro de la aliĝontaj ekskursanoj kaj de ilia interkonsento, aŭ tra Warszawa aŭ tra Supra Silezio. Jam kelkaj samideanoj aliĝis. Informojn pri la detalaĵoj de l' ekskurso petu de Emil Janczałek, Kraków, Dwernickiego 3.

ORGANIZACJA ESPERANCKA w Konstantynopolu łączy w sobie członków 10, często wrogich sobie narodowości.

PISMO STENOGRAFICZNE „Deutsche Kurzschrift“ podaje w każdym numerze streszczenie swych artykułów po esperancku.

RADJO-STACJE prawie wszystkie na świecie (z wyjątkiem Warszawy!) podają kursa i wiadomości esperanckie.

WYDZIAŁ HANDLOWY uniwersytetu w Zagrzebiu (Jugosławja) otworzył katedrę esperanta.

MIĘDZYNARODOWE TOWARZYSTWO DLA BADANIA OKOLIC ARKTYCZNYCH, skupiające 200 uczonych z 19 krajów, uchwaliło na ostatnim kongresie w Berlinie przyjęcie esperanta jako oficjalnego języka dla swych publikacji wydawanych dotychczas po angielsku, francusku i niemiecku.

KOMITET XIV. KONGRESU GEOLOGÓW w Madrycie wydał broszurę o geologii okolic Kordoby w 5-ciu językach, między innymi w esperancie. *Staw.*

MEDYCYNĄ A ESPERANTO. :-: MEDICINO KAJ ESPERANTO.

KONFERENCJA W WARSZAWSKIM TOW. NAUKOWEM.
KONFERENCO EN VARSOVIA SCIENCA SOCIETO.

Dnia 13. XII. u. r. odbyła się w Sali Tow. Naukowego konferencja na temat „Medycyna a Esperanto“. Głównymi referentami byli: prof. Dr. Bujwid z Krakowa, Dr. Robin z Warszawy i prof. Kronenberg z Bydgoszczy. Prof. Dr. Bujwid mówił o tem, że lekarze nieraz po za medycyną zajmowali się innymi naukami, w których zyskiwali niejednokrotnie wszechświatową sławę. N. p. Kopernik, który położył wiekopomne zasługi w astronomji, Chałubiński, znakomity botanik i przyrodnik, Richet, laureat Nobla, wprowadził udoskonalenia w aeronautyce, Jędrzejewicz, pierwszorzędny astronom, Biegański, wybitny filozof, wreszcie Zamenhof, wszechświatowej sławy twórca języka Esperanto. Dr. Robin dowodził konieczności obrania właśnie języka Esperanto, a nie żadnego innego na język obrad na Międzynarodowych Zjazdach Lekarskich, na których wielojęzyczność niszczy główny cel tych zjazdów, wzajemną wymianę myśli. Również prasa lekarska dziś tak wielojęzyczna, jest niedostępna dla ogromnej masy lekarzy. Dalej prace naukowe lekarzy, należących do narodowości niegłównych, dziś są upośledzone, bo muszą być tłumaczone i szukać gościny w piśmie niemieckich lub francuskich, stąd znaczne trudności, opóźnienia i t. d. Nieraz zdarzało się, że wcześniejsze odkrycie naszego badacza było przypisywane Niemcowi lub Francuzowi po upływie 1—2 lat. A podróże lekarzy do klinik zagranicznych? Nie każdy może znać 3—4 języki tak, aby mógł swobodnie porozumieć się z lekarzami i chorymi zagranicą. Lekarze oddawna doszli do przekonania, że tylko jeden wspólny język sztuczny zdoła te trudności usu-

La 13-an de Decembro 1926 okazis en Salono de la Varsovia Sciencia Societo konferenco pri „Medicino kaj Esperanto“. Ĉefaj referintoj estis: prof. Dro O. Bujwid — Kraków, Dro W. Robin — Warszawa kaj prof. L. Kronenberg — Bydgoszcz. Prof. Dro O. Bujwid montris, ke kuracistoj ofte okupiĝas, krom pri medicino, ankaŭ pri aliaj sciencoj, en kiuj ili akiradis neunufoje tutmondan famon. Ekz. Kopernik, kiu havas neforgeseblajn meritojn en astronomio, Chałubiński, eminenta botaniko, Richet, laŭreato de Nobel'a premio, kiu enkondukis plibonigojn en la aeronautiko, Jędrzejewicz, unuaranga astronomo, Biegański, konata filozofo, sine Zamenhof, la fama aŭtoro de Esperanto. Dro W. Robin pruvis, ke nepre Esperanto, kaj ne alia lingvo, devus esti elektita kiel lingvo de Internaciaj Medicinaj Kongresoj, en kiuj la diverslingveco detruas ilian ĉefan celon: la recipokan interŝanĝon de opinioj. Same la medicina ĵurnalaro, nun tiel diverslingva, ne estas atingebla por granda amaso da kuracistoj, plue sciencaj laboroj de kuracistoj, apartenantaj al neĉefaj nacioj, nuntempe devas esti tradukitaj kaj serĉi gastamon en francaj, germanaj k. aliaj gazetoj, kio sekvigas malfacilaĵojn ktp. Nemaŭ ofte okazis jam, ke plifrua scienca malkovro de nia esploristo post 1—2 jaroj estis „denove“ malkovrita de alinaciulo, ĉar la unua laboro ne estis sufiĉe konata. Kaj la vojaĝoj de kuracistoj al eksterlandaj klinikoj? Ne ĉiu povas ellerni 3—4 lingvojn tiel precize, ke li libere interkompreniĝu kun eksterlandaj kuracistoj kaj pacientoj. Kuracistoj jam delonge alvenis al konvinko, ke nur unu komuna lingvo

nać. Za Esperantom w medycynie wypowiedzieli się tacy koryfeusze, jak prof. Richet, Bouchard, d'Arsonval, Broca, Lépine, Forel, Vierordt, Strauss, Sims-Woodhead, Pirquet, mnóstwo uczonych japońskich a u nas Bujwid, Wrzosek, Skłodowski, Świącicki i inni. Jako ośrodek ruchu esperanckiego wśród lekarzy istnieje pismo „Internacia Medicina Revuo“, wychodzące we Francji (redaktorzy: Briquet, Blassberg i Róbin) i centralny Związek lekarzy-esperantystów — TEKA. Prof. Kronenberg podnosił niesłychaną łatwość języka Esperanto, zwłaszcza dla lekarzy i na przykładach dowiódł, że wiele zdań można zrozumieć od razu, bez nauki. Nauka powinna trwać przeciętnie 2—3 miesiące, t. j. 15 do 20 lekcji. Na konferencji byli obecni przedstawiciele Min. Spraw Zagran., Generalnej Dyrekcji Służby Zdrowia, Państwowego Instytutu Higieny. Zebrani, około 100 osób, okazali żywe zainteresowanie, zadawali szereg pytań i zainicjowali kurs dla lekarzy, który odbywa się pod kierunkiem prof. Kronenberga.

arta povos forigi la suprajn malfacilaĵojn. Esperanton en la medicino aprobas tiaj eminentuloj, kiel prof. Richet, Bouchard, d'Arsonval, Broca, Lépine, Forel, Vierordt, Strauss, Sims-Woodhead, Pirquet, multaj sciencistoj japanaj kaj en Polujo: Bujwid, Wrzosek, Skłodowski, Świącicki ktp. Kiel centro de esperanta movado inter kuracistoj ekzistas organo: „Internacia Medicina Revuo“, aperanta en Francujo (Redaktoroj: Briquet, Blassberg kaj Róbin) kaj Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA). Prof. Kronenberg substrekis la eksterordinaran facilecon de Esperanto kaj pruvis per ekzemploj, ke kuracisto povas multajn frazojn kompreni tuj, sen lernado. En la konferenco ĉeestis reprezentantoj de la Ministerio por eksterlandaj aferoj, de la Ĝenerala Direkcio de Saneca Servo kaj de la Regna Higiena Instituto. La ĉeestintoj, entute ĉirkaŭ 100 personoj, montris vivan intereson por la menciita demando, demandis pri detalaĵoj kaj iniciatis la unuan kurson por kuracistoj kaj parencaj fakoj, sub gvido de prof. Kronenberg.

P O L L A N D A K R O N I K O .

KALISZ. LA 5-an II. okazis ĝenerala kunveno de la filio de P. E. A., en kiu al la nova estraro estis elektitaj S-oj: A. Lasiński — pr., Jasiński — vpr., Zakrzewski — sekr., Sadowski — kas., Szpiro — bibl., Anstataŭantoj: Beatus, Charitonenko kaj Czajczyński. El la raporto ni ekscias, ke la societo disvolvas viglan agadon, en kiu ĝi trovas afablan kaj gravan subtenon de la lerneja inspektoro, S-o Gliniecki. Inter la aprobitaj rezolucioj plej multe nin interesas la decido pri subtenado de »P. E.«, kies translokigo al Kraków kaj ligitaj kun tio esperoj estis ĝoje akceptitaj.

KRAKÓW. Eksterordinara kunveno de societo »Esperanto« decidis ekaboni por ĉiuj membroj »P. E.«. Saman decidon alprenis »Pola Esp. Klubo«. (imitinda ekzemplo por ĉiuj aliaj pollandaj grupoj; nur tiamaniere »P. E.« povus ricevi firman bazon. Red.)

KRÓLEWSKA HUTA. »Rondo Esperantista« aranĝis la 29. I. dancvesperon en »Dom Polski«; partoprenis 120 p. Nova kurso por komencantoj komenciĝis la 1. II., gvidata de S-o Kołodziej. La por gejunuloj komencita kurso pligrandiĝis ĝis 48 p.; gvid. S-o Czaja. La 2. II. okazis jarkunveno de Rondo Esp., en kiu estis elektitaj al estraro S-oj: Koło-

dziej — pr., Gerlich — vpr., Kędzior kaj Głowacki — sekr., Stanek kaj Plona — kas., Czaja — bibl.

LUBLIN. Sub la gvidado de s-oj Pleskaczyński kaj Pruski regas vigla agado en la junulara sekcio de la filio de »P. E. A.«. Estas gvidataj Esp. horoj kaj kursoj.

WARSZAWA. Aŭdienco ĉe Sinjoro la Prezidanto de Pola Respubliko. La 6. XI. 1926 la samideanoj Świecimski, Essigman kaj D-ro Czubyński estis akceptitaj de Sinjoro I. Mościcki, Prezidanto de Pola Respubliko kaj prezentis al Li la proponon pri interŝtata interkonsento kaj konvencio koncerne oficialan devigan enkondukon de Esp. al la lernejoj, petante, ke la pola registaro faru la unuan paŝon en ĉi tiu direkto. La petintoj promesis siaflanke instigi ĉiujn organizaĵojn esperantistajn de la tuta mondo, ke ili ankaŭ preparu la aŭtoritatojn kaj la publikon de siaj landoj al favora akcepto de tiu ĉi iniciato. — Sinjoro la Prezidanto, kies intereso por nia movado estas jam delonge konata, ne rifuzis principe ĉi tiun peton, sed klariginte la

momentan neeblecon de tiu paŝo flanke de la pola registaro pro urĝaj aliaj aferoj, instigis niajn samideanojn preparadi pere de alilandaj Esperantistoj favoran akcepton de tiu ĉi ideo ĉe la aliaj ŝtatoj, Samtempe Li bonvolis atentigi la Esperantistojn pri la neceso ekpropagandi nian lingvon en kelkaj rondoj, por kiuj ĝi estas necesega ekz. ĉe la aviadistoj.

Pola Studenta Esperantista Rondo disvolvis viglan agadon inter la tramvojoj, ĉe kiuj ĝi sukcesis fondi Rondon. Ankaŭ tre bonan ideon ĝi ekhavis fondante eldonan sekcion, kies tasko estas liverado al ĉiuj esp-istoj de polaj kaj eksterlandaj eldonaĵoj. Jam nun la sekcio havas multajn librojn, precipe eldonitajn antaŭ la milito de S-o Jan Günther; krome ĝi eldonis en la lastaj tagoj unuan propagandan broŝuron (v. la anoncon). La 14. II. ĝi okazigis ĝeneralan kunvenon, en kiu post akcepto de raporto pri la tutjara agado oni elektis novan estraron: S-o M. Trochimowski — pr., J. Pudel — vpr., F-inoj H. Weinsteinówna kaj S. Świdarska, sekr., S-o E. Jaraczewski — kas.

K O M U N I K O J D E P. E. D.

En la nomo de la ekzekutiva komitato de P. E. D. antaŭmetis ĝia prezidanto, prof. D-ro Bujwid en la Ministerio de publika instruado la statuton de Pola Instituto de Esperanto por aprobo kaj klarigis la gravecon de l' konferenco pri Paco kaj Lernejo okazonta dumproksima Pasko en Praha, al kiu li proponis kiel delegitojn S-ojn: prof. A. Czubyński, M. Kraus, J. Loth kaj L. Kronenberg.

Samtempe preparolis prof. Bujwid kun la ĉefo de pola militista aviado, kolonelo Rayski, la aferon de kursoj

por aviadistoj, kiuj malgraŭ la malhelpoj kaŭzitaj per ilia troa okupiteco verŝajne baldaŭ komencos lerni nian lingvon.

Delegitoj de Varsoviaj societoj rekomendis al prof. Bujwid, prez. de P. E. D. kaj S-o Essigman reprezentanto de Varsoviaj societoj kunvoki komitaton organizantan la postkongreson en Warszawa.

Sub aŭspicioj de P. E. D. okazos la 13. III. en Kraków, ul. Smoleńska 9 publika ekzameno de esperanta kapableco.



BIBLIOGRAFIO.

»Rzeczy Piękne« (Belaj aĵoj). No 1 Januaro 1927, Kraków, eld. de Muzeo Industria.

Luksega, kiel ĉiuj eldonaĵoj de Muzeo Industria, la numero enhavas tre interesajn »Rimarkojn pri la artindustrio«, traktadon pri »Artaj koloriloj« kaj preparolon de lastaj konceptoj en la fakoj de bindarto kaj mebla industrio. Multaj, belegaj bildoj ilustrantaj la artikolojn ornamas la kajeron. La revuo lerte redaktata de prof. K. Witkiewicz donas bonegan ideon pri la nuntempaj artaj direktoj en Polujo.

Enciklika Letero de Lia Papa Moŝto Pio XI-a pri la Universala Reĝeco de Jezuo Kristo. El la latina lingvo tradukis P-o Jos. Schmidt. Espero Katolika, Paris.

Kun ĝojo certe salutas la katolikoj la gravan enciklikon en nia lingvo tradukitan modele kvankam en iom peza stilo.

Th. Monnens, S. J. Nova Afriko. Esperantigis Floriano. Espero Katolika, Paris.

Oni devas admiri la aŭtoron sciopovintan en konciza broŝureto de 23 paĝoj ampleksi la historion, rilatojn, misiistajn penadojn kaj modernan pensmanieron de la nigra kontinento, kiu verŝajne ne unu surprizon kaŭzos baldaŭ al la superregantaj tie eŭropanoj. La interesan broŝuron tradukitan senriproĉe ĉiu volonte tralegos unuŝpire. *Baroko.*

Skotlandaj Pejzaĝoj. Ilustrita. Kongresa Komitato, Edinburg.

La memoraĵo de la 18-a universala kongreso en Edinburg estis reeldonita la belege ilustrita gvidlibro tra Skotlando. Trarigardante la luksajn fotografajojn prezentantajn la historiajn monumentojn de la belega Skotlando, oni havas la impreson de agrabla vojaĝo tra tiu lando.

Universala Esperantigilo Benson School of Esperanto. N-o 3 16-th Ave., Newark, N. Y., U. S. A. 4 libretoj, en kiuj ĉiu ago estas klarigata per desegno; formas tre bonan helpilon por la instruado de nia lingvo. *E. F. C.*

Taubman. Esperanto Krestomatio. (Unua legolibro). Dua eldono. La Marto, Haida, Bohemujo.

Diversaj legajoj, bonstilaj, bone de vera fakulo gradigitaj por komentantoj.

Charles Baudouin. La arto de memdisciplino: Psikagogio. Biblioteko Tutmonda, n-oj 5—6. R. Mosse, Berlin.

La konata sciencisto prezentis pri psikagogio du prelegojn ĉe la Somera Universitato en Genève 1925. La verketo estas prilaboraĵo de la diritaj prelegoj en iom pliampleksigita formo. Psikagogio estas unu el plej novaj sciencaĵoj kaj prof. Baudouin ĝia teoria kaj praktika pioniro; ni povas aserti, ke la esperanta literaturo, sufiĉe ankoraŭ malriĉa je vere sciencaj verkoj, per tiu ĉi ricevis tre gravan pliriĉigon.

En mian pligrandigatan Grabowski-vortaron mi notis el la verketo sekvantajn novaĵojn tre bonajn: potępieńie — malsavo (religia); z punktu widzenia — vidpunkte de; zmysł — sentilo (cetere trovata jam ĉe Grab. sed nur en la pol-esperanta parto); gwałtowny — impet(eg)a; innemi słowy — alidirate; przystępny — venebla.

Common Commercial Terms in English & Esperanto. The Esperanto Institute Ltd. Welwyn Garden City, Herts.

Dekdupaĝa komerca terminaro angla kaj esperanta, taŭga por personoj uzantaj nian lingvon en korespondado komerc-industria.

Kompleta Traktado pri la Prepozicioj (veraj kaj ŝajnaj) kaj pri la Akuzativo per ekzemploj en Esperanto. Wien, XVI., Hanserstr. 103.

La libro taŭgas ne tiom por komencantoj, kiom por perfektaj esperantistoj, kiuj trovas en ĝi grandan aron da ekzemploj pri la ĝisnuna uzado de ĉiuj prepozicioj kaj ankaŭ de la akuzativo. Komencanta esperantisto konfuziĝus de tia amaso da

sciindaĵoj, ĉar la verko pruvas, kiom multe ni devas lerni kaj relerni Esperanton, en kiu pro diversaj kaŭzoj la uzado de prepozicioj resp. de akuzativo estas tiel varianta kiel varianta estas la idearo de l' homoj. Ĉu ne ĝuste tial nia genia Majstro kreis »je« kaj samtempe permesis preskaŭ ĉiam uzi la akuzativon de rilato (»prepozicia akuzativo«), kiu anstataŭas prepozicion! *Dr L. D.*



GARANTIA FONDO DE „POLA ESPERANTISTO“

POR GARANTIA FONDO DE NIA GAZETO DEKLARIS POMONATE : P-o Dro Bujwid 30 zł., Dro Rosenstock 10 zł., Dro Róbin (Warsz.) 20 zł., S-ino Neuberg 10 zł., S-ino Rubinstein 10 zł., F-ino Weinsberg 5 zł. S-ino W. Miernicki (Warszawa) 10 zł.

PAGIS JAM POR GARANTIA FONDO: inĝ. Emiljan Loth (Pabjanice) 100 zł., prof. Jerzy Loth (Warszawa) 100 zł., P-o Bujwid por I.—40, por II.—30, D-o Róbin por I.—20 zł., por II.—20 zł., D-o Rosenstock por I.—10 zł., S-ino Neuberg por I.—10 zł., S-ino Rubinstein por I.—10 zł., F-ino Weinsberg por I.—5 zł., S-o Wł. Miernicki por I.—10 zł., Pastro P. Pięta (Rogoźno) 2 zł.

GARANTIAN ĈENON DE „POLA ESPERANTISTO“

malfermas S-o Maksymiljan Ziomek paginte 5 zł. kaj alvokante S-ojn: Bolesław Czechowski, del UEA en Sosnowiec, Izrael Lejzerowicz, LK-ano en Łódź, Artur Pankratz, Sejmdeputito en Bydgoszcz pagi almenaŭ tiun ĉi sumon kaj alvoki aliajn gesamideanojn.

!! VIVU SEKVONTOJ !!

ADMINISTRACIO.

*

*

*

POLSKI INSTYTUT ESPERANCKI

(Kraków, Muzeum Przemysłowe, Smoleńska 9), urzęduje w niedzielę dnia 13. marca r. b. o godz. 10 przedpoł. publiczny egzamin z języka esperanckiego. Egzamin odbywać się będzie w myśl programu przedłożonego Ministerstwu W. R. i O. P. — Kandydaci winni zgłoszenia swoje nadesłać pisemnie pod wyżej podanym adresem.

Redaktor odpowiedzialny: Juliusz Kriss.

Drukarnia Muzeum Przemysł. pod kierownictwem St. Baranowskiego w Krakowie, Smoleńska 9